SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://www.satesperanto.org/ *** retadreso: satesperanto@free.fr

FINIĜIS GRAVEGA KONGRESO EN BEOGRADO

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Aŭgusto-Septembro 2006 77-a jaro, n-ro 8-9 (1214-15)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €

Kongreso en Beograd

Foto-filmo

Maldekstre:
Unue oni devis ricevi kongresdokumentojn.

Dekstre :
Parto de la gekongresanoj dum la solena malfermo

Maldekstre:
K-do Barkoviĉ salutas nome de k-do Schram kiu ankoraŭ ne alvenis.

Dekstre:
Gejunuloj Majstoroviĉ ludas por ni dum muzika paŭzo.

Maldekstre:
La inaŭguron sekvis agrabla tagmanĝo en fervojista restoracio kun tre bona etoso.

Dekstre:
Komenciĝis serioza laboro. La unuan laborkunsidon prezidas k-do Simeone.

Maldekstre :
Kongresanoj atenteme sekvas la laboron.

Dekstre:
Vespere ni ĝuis la aktoradon de k-do Jerzy Fornal.

Daŭrigo sur la lasta paĝo...

El la redaktejo...

Karaj gekamaradoj,
finiĝis la Beograda kongreso kaj nun restas al ni apliki la kongresajn decidojn. La Kongreso donis al la P.K. kompletan fidon por solvi kiel eble plej bone la aktualan financan situacion (vidu la Deklaracion apude),. kaj la sorton de via redaktoro. Fakte nun mi povas diri ke mia sorto estas en la manoj de la SAT-anoj. Mi ankaŭ fidas al miaj SAT-gekamaradoj kaj daŭrigas mian laboron kun sama elano kiel antaŭe.
Sur la paĝo 121 vi trovas tekston en kiu oni petas ĉiujn respondi al iuj demandoj kaj doni sian opinion. Ni petas vin nepre reagi ĉar nur per komuna kunlaboro ni sukcesos savi kaj konservi nian asocion kiu post mia emeritiĝo devos komplete reformiĝi kaj funkcii sen pagata oficisto. Do ĝin devos funkciigi kaj evoluigi nur volontuloj. Ni ja devas jam nun komenci la preparon de tiuj ŝangoj.
Kalkulante pri la komprenemo kaj fideleco de niaj membroj, kamaradece salutas vin via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Moĉilnik kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❒
Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

79-a Kongreso de SAT en Beogrado
Deklaracio kaj Gvidrezolucio 2006

Deklaracio

La 79-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Beogrado de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2006 :

❏ malakceptas ĉian terorismon, ĉu fare de ŝtato ĉu fare de alia organizaĵo, kiu mortigas homojn ;

❏ SAT alvokas ĉiujn, i.a. esperantistojn, prepari kondiĉojn de longdaŭra paco en Mezoriento per historia klerigado kaj disvolvo de interfratiĝaj rilatoj ĉe ĉiuj koncernatoj cele al akcepto de frataj kaj ekvilibraj solvoj ;

❏ postulas la liberigon de la malliberigitoj, kiujn la usona ŝtato kontraŭjure tenas en la koncentrejoj en Guantanamo kaj aliaj lokoj, je la nomo de la « milito kontraŭ terorismo », kaj postulas la liberigon de ĉiuj politikaj malliberuloj en la mondo ;

❏ rediradas al la landoj, kiuj ankoraŭ ne subskribis la Konvencion de Otavo, ke URĜAS subskribi tiun Konvencion por elimini la kontraŭpersonajn minojn sur nia planedo ;

❏ subtenas la batalon de C.M.C. : Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵoĵetoj el bomboj, kaj deziras, ke SAT eniru en la Koalicion por partopreni en tiu batalo ;

❏ solidariĝas kun ĉiuj bataloj en la mondo kontraŭ la detruo de la socialaj rajtoj kaj alvokas al sennaciigo de ĉi tiuj bataloj; ĝi salutas la venkon de la francaj studentoj, laboristoj, pensiuloj kaj senlaboruloj kontraŭ la "Kontrakto por unua dungo" en Francio ;

❏ alvokas al energia kontraŭstaro de la naciisma edukado trudita en lernejoj en la tuta mondo, kaj aparte solidaras kun la batalantoj por la konservo de la 9-a artikolo de la japana konstitucio ;

❏ protestas kontraŭ la politiko de la Eŭropa Unio, de Usono, Aŭstralio kaj aliaj landoj, kiu i.a. manifestiĝas per fermo de landlimoj kaj forpelo de neleĝe alvenintaj enmigrantoj ; ĝi postulas enmigran politikon kun humanisma sinteno ;

❏ defendas la liberecon de konscienco kaj la rajton ĝin esprimi ; pro tio ĝi ankaŭ promocias la disigon de la eklezioj disde la ŝtato.

Gvidrezolucio

La 79-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Beogrado de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2006 :

❏ petas ĉiujn, kiuj tion povas, helpi al SAT per mondonacoj ;

❏ esprimas sian fidon al la PK por, konsiderante la proponojn faritajn dum la kongreso, solvi la financan krizon laŭ la plej bona maniero samtempe por SAT kaj por Kreŝimir Barkoviĉ, inkluzive per vendo de la sidejo kiel eventuala solvo ; ĉe kio ĝi postulas, ke li okaze de maldungo ricevu la diferencon inter sia antaŭa salajro kaj la ŝtata senlaborula kompenso, kaj ke li poste ricevu enspezon egalan al la antaŭe atendita pensio ;

❏ alvokas plu diskuti la proponon pri Eldonkooperativo de SAT, kun la celo alkonduki decidon per baldaŭa referendumo;

❏ proponas, konsiderante la bezonon pri allogo de novaj membroj, i.a. junuloj, malfermi je limigita tempo la interretan SAT-diskutejon al simpatiantoj, kiuj havas rekomendon de SAT-kamarado ;

❏ vokas al pliriĉigo de la esperanta Vikipedio, ĉefe en ĝia socipolitika parto, al verko aŭ traduko de SAT-rilataj artikoloj en nacilingvaj Vikipedioj, kaj al intima kunlaboro per- kaj por-esperanta kun nacilingvaj retejoj, kies celoj kongruas kun tiuj de SAT ;

❏ rekomendas perretan LEA-kunlaboron, spronas al energia varbado por SAT, kaj vokas al kreado de novaj LEA-oj tie, kie ili ne ekzistas ;

❏ salutas la revigliĝon de la Porpaca Frakcio de SAT.

Ni atentigas al vi ke la DEKLARACIO estas ekstera dokumento kiun ĉiu bonvolu traduki nacilingven kaj sendu al viaj landaj gazetoj.

GVIDREZOLUCIO estas interna dokumento de SAT.